

Ludwig Lazarus Zamenhof,
Mia penso

Sur la kampo, for de l' mondo,
antaŭ nokto de somero,
amikino en la rondo
kantas kanton pri l' espero,
kaj pri vivo detruita
ŝi rakontas kompatante, -
mia vundo refrapita
min doloras resangante.

„Ĉu vi dormas, ho sinjoro,
kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
el la kara infaneco?“
Kion diri? Ne ploranta
povas esti parolado
kun fraŭlino ripozanta
post somera promenado!

Mia penso kaj turmento
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kiun havis mi plej karon²
la junecon - mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
vivi ankaŭ mi deziras, ...
Io pelas min eterne,
se mi al gajuloj iras ...
Se ne plaĉos al la sorto
mia peno kaj laboro ...
Venu tuj al mi la morto,
en espero ... sen doloro.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-276-558 (2005-01-30 22:08:35)

²anstataŭ „Kion havis mi plej karan“, kiel origine skribis Zamenhofo, pro la pli konvena rimparo „karon - altaron“.